



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Specimena numero-unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 85 (Eighth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 julio 1927

WORLD BROADCASTING AND AN INTERNATIONAL LANGUAGE.

By F. T. Simon

(President of Sydney Esperanto Society and Member of Modern Languages' Association).

While the world was still acclaiming and marvelling at the establishment of another remarkable broadcasting record—that of relaying 2LO (London) through PCJJ (Holland) and 2BL (Sydney)—arrangements were well in hand to further extend this service. Paris, Berlin, Vienna, and other important European stations are shortly to be heard throughout Australia and New Zealand.

The underlying motives, it may be deducted, are not solely to provide variety, or of appeasing listeners' constant demands for "something fresh," or even of basking in the limelight of public approval, but, principally, in the manifold interests of Radio Science. Space must be conquered and the ends of the Earth brought together.

Laying away the headphones at dawn, tired but satisfied, after listening from 1.30 to that historic occasion when London was first made available to the general public. I wondered what the next achievement would be. To me, this record seemed the climax—half round the globe was as far as the Magic Spark was

needed; the other half being the return journey, so to speak.

Yet, we, in this Age of Speed and Miracles, expect records to be turned out like condenser plates at a factory. So often have we been told: "Only the surface of Radio has been scratched," that with confidence almost child-like, we look to our wireless technicians to beat each new performance with something even more startling.

But how many stop to ponder the more obvious questions: What will this World Broadcasting lead to? Will it encounter any obstacles?

Again using the recent 11,000 mile relay as an illustration, has it occurred to you over how many countries the human voice was carried, and the number of languages spoken en route? This is by no means an irrelevant question, because language plays an important part in broadcasts over such an extensive area.

To many, therefore, this relay must have been unintelligible, only those possessing a knowledge of English being able to understand what transpired, apart from musical items. That the experiment was primarily intended for Australia, South Africa and India, is but a subsidiary matter.

Davis Cup results, news items, meteorological reports, and particularly station announcements, may be taken as of general interest, but failure to know our language would

place all this knowledge beyond the reach of a foreign listener. Very well then, you may say, let them learn English! Just here lies the catch.

Shortly we are to hear Berlin, Paris, and Vienna, perhaps Rome, Madrid, and Copenhagen. Will these transmissions be made in English? Certainly not! Strange languages will assail our ears and, unless we are acquainted with them, no matter whether the voices talk to us about minor or major happenings, we will be given an opportunity of knowing just how much we don't know!

Herein rests the problem. World Broadcasting is to be effective something must be done to make the spoken word understood by every listener.

To render everything into half-a-dozen languages is impracticable; consider the time and trouble alone. Besides, have you heard the broken English of that Dutch announcer? I have, and was forced to smile.

Yet there is a reasonable way of overcoming this difficulty. By adopting an international auxiliary language. Its necessary qualification must, of course, be simplicity; easily pronounced, easily understood, and easily learned.

Prominent radio men and influential wireless organisations have delved deeply into this matter during the last few years, and it is surprising that their findings are not more widely known in Australia. With few exceptions the verdict, singly and collectively, has been in favour of Esperanto.

Why Esperanto? Because its adoption will not engender rivalries which that of any other language would entail. In other words, its neutrality is its safeguard. In addition, it has those attributes just mentioned. A Radio Language must always have as its chief object the purpose of serving all people alike, and placing none at a disadvantage.

By using Esperanto side by side with the national tongue it would be a matter of indifference whether the broadcast were received from London, Buenos Ayres, or Tokio.

This method is actually in practice at several radio stations in Europe,

and practically all of the more important ones devote certain hours regularly throughout the week to giving instruction in Esperanto.

Curiously enough, those continental stations whose programmes it is proposed to first transmit to us, are amongst the more ardent advocates of Esperanto, and, providing the time chosen is one that coincides with that of an Esperanto lesson, Australian and New Zealand audiences may have a chance of hearing that language explained from either Paris, Berlin, or Vienna.

—"Wireless Weekly," 24th June, 1927.

WELL KNOWN ENGLISH ESPERANTIST HONORED BY THE KING.

Word has just come from England of an honor that had fallen upon a veteran Esperantist. At the Congress in Krakow in 1912 there appeared an elderly gentleman then hardly known among samideanoj. He was Ebenezer Howard, founder of the Garden City movement, and at that time lecturing through Europe on the subject, in Esperanto. Mr. Howard's work in town planning and in providing ideal conditions for industry and domestic life had brought its recognition from the King, for now he is known as Sir Ebenezer Howard.

On the journey from Vienna to Krakow two Esperantists in one of the compartments were delighted that they had many views in common and the hours passed quickly. One of them was much impressed by the thoroughness of the preparations being made for the coming Congress and said: "Do you know they not only picked out the hotel for each visiting delegate but have assigned him his roommate." In proof of this he pulled out from his pocket the form letter from Congress headquarters reading: "Ebenezer Howard, Hotel de France, Room 19. Roommate H. W. Hetzel, Philadelphia, U. S. A." remarking as he had not met the person he didn't know what kind of a chap he was. We have President Hetzel's word for it that he was the other fellow! The coincidence was a cause for much merriment between them.

LETERO AL AMIKO EN EŬROPO.

Estimata samideano,

Multaj aŭstralianoj kiuj vizitis Papua, revenante al Aŭstralio, rakontis strangajn historiojn pri raso de palmipedaj homoj, kiu laŭ famo loĝadas en la marĉego Agaiambo. Referato al tiuj ĉi strangaj homoj troviĝas en la jara raporto de la leŭtenanto-gubernatoro (Kavaliro H. Murray).

Li neas la famon, ke la indiĝenoj estas palmipedaj, sed raportas, ke ili estas neordinare interesaj homoj.

—Mi restis unu tagon—, diris la gubernatoro, —inter la popolo de la marĉego Agaiambo en golfo Dyke Ackland, kiuj, la famo diras, estas palmipedaj. Kompreneble ili ne estas palmipedaj, kaj tre similas al la ĉirkaŭaj indiĝenaj rasoj. Eble la muskoloj de iliaj kruroj malpli evoluis ol tiuj de la rasoj, kiuj kutimas marŝi kaj kuri en la arbarego, ĉar tiuj ĉi indiĝenoj, kiuj loĝadas en la marĉoj, kiam vojaĝas per kanotoj, kaj malalte subordigas; sed, se estas diferenco, ĝi ne estas rimarkebla. Ni atingis la marĉegon, unue per ŝalupo, kaj poste, kiam la rivereto tro malprofundiĝis por permesi la uzon de la ŝalupo ni veturis per kanotoj.

Ĝi estas bela loko, kie la marĉo larĝiĝas kaj kovriĝas de purpuraj kaj blankaj akvolilioj, kaj tie ankaŭ abundas marĉbirdojn. Troviĝas nur du malgrandaj vilaĝoj, en kiuj loĝadas malpli ol 100 homoj; la domoj estas konstruaĵoj, konstruitaj sur longaj stangoj super la akvo. Tiuj ĉi indiĝenoj nutras sin per malgrandaj fiŝoj, sago (nutra faruna nutraĵo farita el la medolo de iuj specoj de indiĝenaj palmoj, kiuj kreskadas sur la marĉbordo), kaj de tempo al tempo marĉbirdoj, kiujn ili kaptas per retkaptilo. Ili havas kelkajn porkojn, kiujn ili metas sur estrado . . . kie ili restas ĝis oni bučas ilin.

Ĉiu porko havas apartan estradon, sed ili neniam tuŝas la sekan teron; fakte ili neniam vidas ĝin. La vivo devas esti tre unutona por tiuj ĉi marĉloĝantoj, preskaŭ tiel unutona kiel ĝi devas esti por iliaj porkoj. Ili posedas nenian propran teron, sed oni informis min, ke ili jam komencis kulturi unu aŭ du terpecojn, supozeble laŭ permeso de la terposedantoj. —Iufoje ili laboras ĉe la plantejoj,

kaj mi supozas ke iom post iom ilia sorto pliboniĝos, sed nuntempe ĝi ne estas enviinda.

Malmultaj aŭstralianoj scias, ke kelkaj el la plej multekostaj gemoj troviĝas en nia hejmlando. Eĉ parlamentanoj miris, kiam sinjoro Blakeley demandis de la Ĉefministro en la parlamentejo, ĉu li povas aranĝi montradon de iaj el la maloftaj kaj belaj gemoj . . . opaloj, safiroj, turmalinoj, topazoj kaj rubenoj, ĉe Kanberro; por ke vizitantoj el aliaj landoj povu vidi ilin kaj priparoli ilian belecon en aliaj landoj.

Ne kontenta pri la promeso de la Ĉefministro, ke li pripensos la aferon, sinjoro Blakeley mem aranĝis montradon de Aŭstraliaj opaloj ĉe la Melbourne Parlamentejo por ke la parlamentanoj, inter kiuj estis la Ĉefministro, vidu kiaj belaj gemoj troviĝas en Aŭstralio. La opalojn oni montradis antaŭ kelkaj tagoj en la salono Queen's. Oni elmontris ilin en ĉiu diversa grado de traktado, de la natura stato, kiel krudaj ŝtonoj, ĝis la perfektigitaj stato, kiel kolĉenoj el belaj, rondaj opaloj, valorantaj 150 ĝis 300 funtojn sterlingajn, aŭ kiel ravaj kameoj el blindetiga koloro.

Sinjoro Blakeley diris, ke la plej belaj opaloj troviĝas ĉe White Cliffs. Grawin, kaj Lightning Ridge. Troviĝas aliaj ĉe okcidenta Kvinslando, kaj ĉe la montaro Stewart en Sud-Aŭstralio. Ĉiuj gemoj montritaj estis rave belaj, kaj la parlamentanoj kiuj vidis ilin partoprenis en la entuziasmo de sinjoro Blakeley pri la eventuala gemkomerco de Aŭstralio.

Antaŭ kelkaj tagoj fiŝkaptisto ĉe Welshpool (haveno ĉe la suda marbordo de Viktorio) portis al Melbourne tre interesan fiŝon. La fiŝo, kiu estas indiĝena al Eŭropaj maroj kaj estas konata kiel Hispana skombro, estis stampita ĉe la flanko. Oni supozas ke la fiŝo estis stampita, kiam ĝi eble estis unujara, kun la celo studian migradon.

Grandaj nombroj de tiuj fiŝoj estis vidataj ĉirkaŭ Viktorio dum la lastaj 12 monatoj, kaj kaptiĝis ĉe la marbordo Ninety Mile kiu etendiĝas de la lagoj Gippsland ĝis golfo Cor-net.

La fiŝkaptisto diris, ke la fakto, ke tiom multe el tiuj fiŝoj tien ĉi venis kaj restadis dum unu tuta jaro, ŝajne

pruvas ke plaĉas al ili la Viktoria marbordo.

La fiŝkaptisto opinias, ke tiu ĉi strange migranta fiŝo eble anstataŭas tiun specon de fiŝo loke nomita Trevalla, kiu antaŭ ne longe forlasis siajn marbordojn.

Kiam la fiŝo estis montrita al Eŭropa fiŝvendisto en Melbourne, li diris, ke en Hispanujo oni multe ŝatas ĝin, kaj ke oni povas vendi ĝin je alta prezo. Tie ĉi ankaŭ la fiŝo estas multekosta.

Kun amika saluto, via fidele, P. H.

AL LA INTERŜANĜISTOJ FILATELISTOJ KAJ KOLEKTISTOJ DE POSTKARTOJ.

Laŭ pluraj petoj, ni proponas la kreadon de vasta asocio por permesi al ĉiulandaj kolektistoj reciproke interkonatigon instigantan al ĉiuspecaj interŝanĝoj.

Tiu-ĉi asocio posedas sian propran gazeton redaktotan franclingve kaj esperante. La gazeto enhavas la liston de ĉiuj membroj kaj ankaŭ informojn pri aperoj de poŝtmarkoj kun konsilojn de spertaj kolektistoj. Se kiel ni esperas ni ricevos ĉiujn helpojn kiujn ni antaŭvidas, la unua numero de tiu-ĉi bulteno — kompreneble rezervata nur por la anoj — aperos proksime.

Jam dank'al niaj personaj rilatoj en esperantaj rondoj, ni estas certigitaj pri multaj aliĝoj en diversaj landoj.

Diru plue ke estos senpaga la abono sed la anoj devos aboni la monatan bultenon. Abonprezo en Francando: 8 franc. frankoj malplikarigita al 6 fr. frankoj por membro de U.E.A. (aliaj landoj: 14 kaj 12 fr. frankoj).

Diversaj premioj, speciale pligrandigoj de la abontempo kaj eĉ dumvivaj abonoj estos donataj al la anoj kiuj akirigos pli da 3 novaj aliĝoj.

Aliparte por la kolektistoj ne konstantaj francan aŭ esperantan lingvojn, aperos speciala multlingva kodo.

Ĉiu filatelisto intencanta riĉigi sian albumon sen multaj kostoj interŝanĝe de siaj propraj "duobloj," ĉiu kolektisto de ilustritaj kartoj deziranta tutmondan korespondadon bonvolu sendi al ni sian aliĝon, konigante nur la celon kaj la kondicojn de sia propono pri interŝanĝado.

LEVY,

45, rue Courloison, Provins (S-et-M.)

KRONIKO.

SYDNEY, N.S.K. — La propagandado de nia lingvo spertis tre plezurigan vigilon en la gazetaro pasinta monate. Longaj artikoloj aperis en "Evening News," "Sydney Morning Herald," "The Sun," "Sunday News," kaj "Wireless Weekly." Ĉiuj vekis intereson kaj el multaj enlandaj urboj venis demandoj pri plua informo. Denove montras, ke se la temo estas interese kaj laŭmomente la ĵurnalaro ĝin akceptas kaj la legantaro siavice respondas per akrigita scivolemo. Do, propagandu!

"Sydney Esperanto-Societo" donis al sia anaro sekvantan programon dum monato Junio:—

Junio 2a. — Parolado de la prezidanto pri "Ido kaj Esperanto Komparataj (Fino)."

Junio 9a. — Laŭtleĝado de teatraĵeto "George Dandin," per sep anoj, f-inoj Cullington, Fairfield kaj Jolliffe, kaj s-roj Davies, Rutland, Simon kaj Torr.

Junio 16a. — Vizitis la klubejon f-ino Maud Helm kaj s-ro Maurice Hyde (Melbourne), kiuj alparoladis la membrojn. S-ro Hyde travojaĝis al Brisbano, kie li estis registrare transloĝigita por oficiala okupo.

Junio 23a. — Tre sukcesa koncerto kaj dancado ĉeestata de 60 personoj. La Centra Oficejo de U.E.A. pro kies bono la festeto estis aranĝita, ricevos plurajn funtojn sterlingajn.

Okaze de rekordfrapanta relajo de Londona Radio-programo per Philips Eksperimenta Stacio en Eindhoven, Hollando, ricevita kaj redisaŭdigita de 2BL, Sydney, je 21a. majo, la Sydney Esperanto-Societo sendis gratuleteron al ĉiuj partoprenintoj, samtempe rekomendante la gradon uzadon de Esperanto por internaciaj disaŭdigadoj, precipe dum anoncado de la ĉefstacio en Hollando. La distanco estas pli ol 10,000 mejloj (16,000 k.m.), kiu facile konstatas mondrekordon.

Ĉe ripeto la 24a junio, kiam Londono, Radio-Paris, kaj Langenberg (Germanujo), estis klare aŭdebla, la loka societo denove sendis leteron kun sama enhavo al la diversaj fremdaj radio-stacioj.

Aliŝtatanaj kaj Nov-Zelandanoj, kaptante estontajn relajoj, estas petataj fari saman rekomendon.

S-ro Simon, kiu aŭskultis ambaŭ transsendoj dum la fruaj matenhoroj, raportas, ke dum germana parolado el Langenberg, je 5.43 a.m. (Sydneya tempo), li definitive aŭdis la vorton "Esperanto," sed ne povis bone kapti la tekston. Estas bonkonata, ke la plejmulto de la germanaj stacioj, kiel ekzemple multaj da francaj, tre favoras Esperanton. Oni tial miras, ĉu la germana stacio uzis la okazon propagandi iomete.

AUCKLAND, N.Z. — La hejmo de S-ro A. E. Dewing ĉe Remuera estis la kunvenejo por ĉirkaŭ tridek da samideanoj dum la vespero de 31a majo. La okazo estis pro festo en honoro de gesroj M. J. Ravelich, kiuj kunedziĝis dum pasinta paskotempo. Post mallonga parolado s-ro J. S. Russell, prezidanto de la ĉi tiea Asocio, transdonis, en la nomo de la samideanaro tie-ĉi kaj aliloke, al la gastoj donacojn decajn al la okazo. S-ro Ravelich, esprimante dankon pro sia edzino kaj mem, diris ke tia amikeca kunveno troviĝas nur inter Esperantistoj. La ĉeestantaro konkludis tre ĝuitan vesperon per la ankantado de "La Vera Frataro."

WANGANUI, Nova Zelando. — S-ro. Instruisto F. E. Moreton ĉe la "Friends' School" instruas Esperanton al klaso de infanoj, kiuj bone progresas en siaj studoj. S-ro Moreton raportas ke la geknaboj ŝatas la lingvon precipe kanti en Esperanto.

WELLINGTON, N.Z. — Brodkasto de parolado pri Esperanto okazis de radio-stacio 2YK dum 18a majo. La parolinto, s-ro King, en kvaronhora lekcio pritraktis la temon "La Esperanta Biblio."

La delegito kaj vic-del. de U.E.A. (S-roj Dust kaj King, respektive) nun sin okupas rilate al varbiĝo de novaj membroj por U.E.A., kiu estas petinta ĉiun delegiton energie agi tiudirekte, tiel plifaciliganta la aferojn de la Asocio, kiu pro manko de

mono estas nune grave minacita.

ADELAIDE, S.A. — A new group has been formed at North Adelaide, and a class of children also are being instructed in Esperanto. When Dr. Williams was here he gave a talk from 5CL. As a result many enquiries were received and books sold, mostly in outlying places.

MELBOURNE, V. — Antaŭ kelkaj semajnoj la anoj de la Melburna Esperanto Societo debatis pri tre interesa temo "Aŭstralio por la Blank-rasoj" kiu elvokis multajn diversajn opiniojn. Tamen, je la fino, oni decidis ke tiuj, kiuj parolis por la propono, gajnis; kiu decido tre kontentigis la plejmulton.

Antaŭ nelonge, komitato estis elektita por aranĝi serion de dancoj. La unua danco, kiu okazis je la 17a junio, en la klubĉambroj, estis granda sukceso. Ornamita de verdaj kaj blankaj girlandoj, la dancĉambro aspektis tre bele. La dancado daŭris ĝis la deknua horo, kaj inter la dancoj la ĉeestantoj partoprenis en amuzaj ludoj kaj vigla interparolado. Multaj ĉeestis kaj la vespero pasis tre gaje kaj feliĉe. La proksima danco okazos je la 15a de julio.

Kelkaj Esperantistoj renkontiĝis lastan dimanĉon posttagmeze, kaj ĝuis tre bonan promenen de orienta Kew ĝis Balwyn. La vetero estis tre aĝrable kaj la piedirantoj tre ĝuis la marŝadon. De monteto nomata Berrick Parko, kie troviĝas soldata monumento sur la supro, la anaro vidis tre belan panoramon; en la proksimeco la valon kun kampoj kaj arboj, kaj en la distanco, la montojn, kiuj aspektis tre bluaj pro la malproksimeco kaj la duonkrepusko.

PERTH, W.A. — At a meeting of Esperantists held in Perth, W.A., on June 21st, it was unanimously decided to reform the old "Nigra Cigno" group. The following officers were

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE MELBOURNE.

elected:—President, S-ro Goode. Secretary and Treasurer, S-ro. McGuire. Weekly meetings will be held every Tuesday at "Gracemere," Hay Street east. We cordially congratulate the *gesamideanoj* and officers on the success of their efforts.

ESPERANTO BY RADIO.

Arrangements having been completed with the New Zealand Broadcasting Company, a radio course of Esperanto lessons will be commenced from the new super-station, 2YA (Wellington) on the 14th July. Consisting of about twenty lessons, one being broadcasted each Thursday evening from 7.30 to 8 p.m. (N.Z. time), the course will be conducted by Mr. W. H. King, who has also arranged with the journal "N.Z. Radio" for the publication of the lessons prior to their being broadcast from the station.

Having a strength of 5,000 watts, 2YA is the most powerful in New Zealand and one of the four strongest in the Empire. The station is audible in all parts of New Zealand and programmes should be well received by Australian listeners.

Listeners in both countries are requested to notify reception of the Esperanto course to the station (N.Z. Broadcasting Company, Wellesley Club Chambers, Wellington) for by so doing encouragement will be given to all working in connection with the course. New Zealand subscribers to the Suda Krucio are specially invited to give the course as much publicity as possible; also to inform their radio friends of the opportunity which is being afforded them to gain a knowledge of Esperanto.

To the Editor, "Suda Krucio."

Sir,—A well-wisher of the Melbourne Esperanto Society in the person of f-ino L. Law has been good enough to forward to the Hon. Librarian M.E.S. a number of unused books by Zamenhoff as a gift to the Library.

This gift is much appreciated and should you be able to grant space in your journal, the thanks of the M.E.S. will be suitably demonstrated.—Yours, etc.,

C. G. ROBERT, Bibliotekisto.

MUSIC AND ESPERANTO.

Esperanto has made great strides during the last few years. It has passed through the purely experimental stage, and has become a recognised international auxiliary language. The day has passed when it was regarded by many as a fad. People in all lands make use of it for every conceivable purpose.

The question arises as to whether it is used for musical purposes as much as it deserves to be. Students of Esperanto will agree that the phonetic rendering of words, combined with stress on the penultimate syllable, provide most euphonious expression when used in song.

No language is more beautiful than the Italian for rendering opera and national songs. The same may be said of Esperanto, and no better corroboration is needed than that of the choral items rendered by Esperantist singers at recent Congresses.

The extreme flexibility of Esperanto enables a competent vocalist to sing with ease and without visible effort. This characteristic feature of the international language offers to a singer what so many national languages lack, i.e. a medium by which the most delicate shades of thought may be expressed in song; it lends itself to musical coloration and vividness.

Most music lovers recognise and appreciate this quality in the vocal presentations given by many eminent visiting Italian singers in recent years.

The writer is of opinion that a well trained quartet party or a small choir singing entirely in Esperanto would score marked success before Australian audiences.

As a means of propaganda there can be no doubt that an Esperanto Concert Party would perform valuable work in demonstrating the beauty and advantages of the language. Music, like Esperanto, knows no nation; both are truly international; each has its mission of peace and good-will to all men.

ESPERANTISTA RESPONDKUPONO.

La Centra Oficejo de U. E. A. havis la feliĉan ideon eldoni specialan esperantistan respondkuponon, kiu plenigos grandan mankon trovitan de ĉiu samideano por la alsendo de malgrandaj monkvantoj, kiel pago de informoj petitaj la U. E. A.-Delegitoj aŭ de iu ajn mendo malmultvalora. Ĝi ne havas la malavantaĝojn de la internacia poŝta respondkuponon, kiuj estas: ne esti ĝenerala por ĉiuj landoj, aĉetebla nur en kelkaj urboj kaj nur en la grandaj oficejoj, cirkulado dum limigita tempo, trokareco de ĝia kosto de aĉeto, kompare al ĝia reala valoro, k. a. La nova kupono plie validas dum 3 jaroj, estante reakceptata ĉiam dum tiu tempo kaj je ĝia nombra valoro de U. E. A. Tiu kupono povas kaj devas esti la vera sangmono de la esperantistaro, kompreneble por malgrandaj sumoj sendotaj enlande kaj eksterlande, kaj esperos antaŭ la neesperantista publiko kiel nova pruvo de la potenco kaj solidareco de nia movado.

SHORTHAND AND ESPERANTO.

The shorthand press is displaying considerable interest in a parliamentary adaptation to Esperanto of the German shorthand system, Stolze Schrey, by Mr. Kreuz, the General Secretary of the International Central Esperanto Committee. The proceedings of the last Universal Esperanto Congress in Edinburgh, were taken down by two shorthand-writers, one using the Stolze-Schrey system and the other Pitman's.

The New German official system (Reichskurzschrift) has recently been adapted to Esperanto by a well-known German shorthand-writer, Karp Walton, the senior German Esperantist.

Professor Scheller of Hildburghausen, Thuringia, has published an adaptation of "Stenotachygraphic" to Esperanto.

The committee of the Arends school (the Arends system is widely disseminated among German workmen) has also decided to prepare an adaptation of its system.

—I.E.S.

VICTORIA COMES IN TO LINE.

We gratefully acknowledge having received from Mrs. R. B. Bigelow, Victorian Congress Secretary, the sum of 25/-. This represents the amount paid by those Victorian Esperantists who intended to take part in the Hobart Congress. Those who contributed were unanimous in deciding to hand the amount over to La Suda KrucO. As we are continually faced with a climax in our finances, we gladly welcome this and similar donations. The material help is most timely and fully appreciated.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Argentina Esperantisto, 10; Arbeiter Esperantisten, 4-5; British Esperantist, 266; Belga Esperantisto, 3-4; Bulteno de la Antverpena E. Komitato, 4-5; Der Arbeiter Esperantist, 5; Esperanto-Anzeiger, 4; Heroldo de Esperanto, 15, 16, 17, 18, 19, 20; Internacia Esperanto-Servo, 15-16; International Language, April, May; Internacia Medicina Revuo, 3; La Unuigita Tuthomaro, marto, aprilo; La Suno Hispana, 119, 120; La Lernanto, 47; Pacifika Espero, 23-24; Revista del Ateneo, 8; Svenska-Tidningen, La Espero, 4; Verda Stelo, 4; Vegetarano, 2.

Syria.

In view of the language difficulty in Syria, students of different nationalities are greatly interested in Esperanto. In the American University at Beirut three classes in Esperanto, with 60 pupils, have just been organised under the direction of professors speaking respectively Arabic, Persian and Armenian.

An Esperantist group is in course of formation in that town.

—I.E.S.

ALVOKO AL VERKEMAJ ESPERANTISTOJ ĈIULANDAJ!

Ni serĉas en ĉiuj landoj Esperantistojn kiuj estas kapablaj verki aŭ traduki diverstemajn artikolojn pri literaturo, tekniko, sciencaj kaj aliaj temoj. Interesiĝantoj sendu siajn adresojn tuj per simpla poŝtkarto al L. Dedericks, Hannover, Sallstr. 124 (Germ.)

JARA KUNVENO.

La jara kunveno de la Melburna Esperanto-Societo okazis 24 junion, ĉe la kunvenejo 323-5 strato Bourke, Melburno. La jenaj oficistoj estis elektitaj, Prezidanto, s-ro N. Grant; Vicprezidantoj, s-roj J. Skurrie kaj P. Hudson; Sekretariino, f-ino V. Cox; Kasisto, s-ro E. Cox; Bibliotekisto, s-ro H. Byatt; Helpbibliotekisto, s-ro J. Robert. La Kasisto raportis malgranda kreditbalanco por la klubo, kaj la Bibliotekisto raportis pligrandigita balanco por la biblioteko.

THE BIBLE IN ESPERANTO.

The first edition of 3,000 is already nearly exhausted. A fresh issue is in hand. 2,000 copies of the penny Gospel of Mark have just been issued.

ESPERANTISTA AKADEMIO.

Elektaj en la Lingvan Komitato. Voĉdonintoj: 107. Estas elektitaj: Nova membro: S-ro Cogen. (101 voĉ.); Elirintaj membroj: S-roj Lundgrew 99 voĉ.; Krestanoff, 98; Grau Casas (Josep), 97; Torok, 95; F-ino Pulvers, 93; S-ro Blok, 91. La Sekretario, R. de Lajarte. La Prezidanto de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, Tr. Comit.

En la juĝejo.

Juĝisto: "Vi batis la atestanton tiel, ke li ne povis labori tri tagojn."

Kulpigito: "Sed mi, sinjoro moŝto, mi eĉ ne povis skribi du tagojn, tiel doloris mia mano."

Singarde.

la vojaĝisto: "Mi ĉiun nokton metas mian monujon sub mia kapkuseno."

2a vojaĝisto: "Tion mi ne povas, ĉar tiel alte mi ne povas dormi."

ANONCO.

Zdenek Skalsky, fotografisto Ĉervery Kostelec. Ĉeĥoslovakio deziras poŝtmarkojn, poŝtkartojn, kaj fotojn interŝanĝi. Ĉiam respondas.

A CORRECTION.

It is regretted that the name of Mr. J. Majstrovich was inadvertently omitted from the list of N.Z. donors to the S.K. which was published in our May issue. Mr. Majstrovich generously donated the sum of 5/- to La Suda Kruco which amount is now acknowledged with thanks.

BRISBANE ESPERANTO CLUB kunvenas la trian Mardon ĉiumonate, 7.45 p.t.m., ĉe State Service Union Room, trian etaĝon, King House, Queen Str. Vic-Prezidanto, C. Kidd. Sekretariino, Miss E. B. Carrick, Office of Supt. Telegraphs, G.P.O., Brisbane.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro N. Grant; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. T. Simon, Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, 323-325 Bourke Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.